



Dana Fervojoisto estas organo de Dana Esperantista Fervojoista Asocio (DEFA)

Prezidanto:
Jan U. Niemann
Hovedvagsstræde 9 E, 1
DK-3000 Helsingør
tel 71 70 63 83
aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
Manøvej 6
DK-4700 Næstved
tel 55 72 73 77
bankkonto (Lån&Spar)
0400 201071007539

Redaktantoj: Jan kaj Lene Niemann
Vidu adreson supre.

Preso: HVS9E1

Redaktofino por venontaj numeroj de Dana Fervojoisto:

15/2-2014
1/6-2014

Dana 4

Fervojoisto

ISSN: 1397-9914

66a jareldono

Novembro 2013

Enhavo:

- paĝo 2 Aktivecoj
- paĝoj 3-4 Astrid 80-jara
- paĝoj 5-11 Temo de la jaro
- paĝoj 9-10 La arto krei kon-traktojn
- paĝo 12 Fervoja novaĵo.
- paĝo 13-14 Fervojo en Islando
- paĝo 15 Temo de la jaro

66^a IFK – majo 2014



Ne forgesu ... aliĝilo kaj aliaj informoj haveblas ĉe la prezidanto.



DEFA deziras al ĉiuj membroj, legantoj kaj amikoj belajn decembrajn tagojn kaj ĉion bonan por la nova jaro

(fotis Jan Uldal Niemann)



Aktivecoj de DEFA:

Ekde septembro ni denove kunvenas unufoje monate. La kunvenoj okazas en Køge ĉe Astrid kaj Erik aŭ en Næstved ĉe Karen. Ni renkontiĝas je la 18-a horo, kune manĝas, pritraktas taskojn, kiujn sendas Heinz Hoffmann pri terminologiaj aferoj, kaj ni strebas fari artikolojn por IF kaj Dana Fervojisto kaj prezentojn por la venontjara kongreso.

Ni kunvenos la

**26an de novembro, 14an de januaro,
4an de februaro, 18an de marto kaj 8an de aprilo**

Por pliaj informoj kaj aliĝo, turnu vin al la prezidanto.

Bedaŭrinde ni devis pro diversaj kialoj prokrasiti la planitan ekskurson ĝis la printempo. Vi aŭdos pri tio poste.

Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

Kopenhago

Kunvenoj de KEK (prezidanto: Peter Wraae, tel 46 49 60 16, retadreso kek@esperanto.dk) okazas en Kulturhuset, Toms-gårdssvej 35, 2400 Kbh NV. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

Århus

Kontaktulo pri DEFA: La prezidanto.

Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en Seniorcentret, Østergade 30, dua etaĝo je h 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.

Temo de la jaro ... aldono al artikolo en Dana Fervojisto 3 / 2013

Bertha von Suttner ankoraŭfoje ...

Pasintnumere ni rakontis pri la aŭstra pacbatanto Bertha von Suttner. Atentema leganto informis, ke ni forgesis gravan flankon de ŝia aktivado, nome ke ŝi interesiĝis pri Esperanto. Oni ne scias, ĉu ŝi parolis la lingvon, - verŝajne ne

El Vikipedio pri la en esperanton tradukitan libron 'For la batalilojn!':

En la antaŭparolo de la libro skribis D-ro Heinrich Arnhold i.a.:

Laŭ ŝia diro: „*La pacifismo kaj Esperanto estas kuzoj!*“ (estis la teksto de telegramo, kiun *Bertha von Suttner* foje sendis al la Dresdena Esperanto Societo).

El la interreta paĝaro de SAT-amikaro (aŭgusto 2004) :

Kvankam aristokrata, vivanta en landoj kie ekzistis lingva rilato dominantodominato, *Bertha von Suttner* aprobis mem la ideon de Esperanto kaj perceptis ĝiajn potencialaĵojn : "En ĉiam kreskanta internaciismo, kiu ligos la popolojn de la mondo al la paca kuniĝo, mi opinias, ke la lingvo Esperanto estas la plej grava organo. Enkonduko de tiu ĉi lingvo kiel devigan lernobjekton en ĉiuj lernejoj estas la plej proksima celo, al kiu oni devas strebi. Kiam tio okazos en Aŭstrujo-Hungarujo, lingve disŝirita, kiel tio eflikos egalige kaj pacige ! *Precipe en la tempo sub signo de flugmaŝinoj, submaraj tuneloj kaj sendrata telegrafio kaj ĉiam pligrandiĝanta trafiko, oni ne povas imagi la mondon sen la mondlingvo.*"


Dankon al Martin pro la atentigo – red.

Nova vivo en muzeo Árbæjarsafn

Meze de la 20-a jarcento ekestis koncerno, ke 'malnova Rejkjaviko' malaperas, kaj ke oni devas fari ion. En 1942 estis la unuaj klopodoj fondi muzeon, sed nur en 1954 la 'Rejkjavikaj Arkivo kaj Historia kolekto' estis fondita, kaj la unua direktoro Lírur Sigurbjörnsón komencis kolekti plej diversajn aferojn por la muzeo.

La malnova bieno Árbær, kiu jam delonge estis populara restoracio, estis forlasita, kaj la konstruaĵoj en mizera stato. En 1957 oni malfermis urban parkon kun liberarea muzeo en tiu loko, kaj ekde tiam la loko portas la nomon Árbæjarsafn (safn = kolekto).

En tiu populara muzeo, kiu ricevis la islandan premion pri muzeoj en 2006, la renovigita lokomotivo Pionér ricevis 'novan vivon', dum Minör staras kiel memor-objekto en la haveno de Rejkjaviko.



La lokomotivo Pionér en la muzeo Árbæjarsafn

ABI fariĝos 80-jara ...

La 5an de decembro 1933 naskiĝis en la koro de Vandailio eta knabino, - tro frue laŭ la prognozo, kaj tiam ne estis la multaj malsanulejaj ofertoj kaj eblecoj helpi kaj subteni, kiam infanoj naskiĝis 'antaŭ tempo'. Sed Astrid, kiu portas la nomon de reĝino, estis persista, obstina kaj kuraĝa, kaj ŝi konvinkis ĉiujn malfacilaĵojn.

Nun, post nelonge, Astrid fariĝos 80-jara, - daŭre ŝi havas koron por Vandailio, kaj daŭre ŝi estas persista, obstina kaj kuraĝa ... daŭre ŝi konvinkas la obstaklojn, kiujn donas al ŝi la vivo, kaj ĉiuj ĉirkaŭ ŝi povas nur admiri ŝin kaj la multajn farojn kaj opukojn, kiujn ŝi majstras.



En Grønnegade, Næstved, ni dancis ĉirkaŭ la ABlo ... (fotis Jan Uldal Niemann)

Verŝajne vi ĉiuj konas Astrid-on kaj ŝiajn multajn talentojn. Ŝi partoprenas, kontribuas kaj valorigas, kie ajn ŝi estas. En DEFA, en IFEF kaj en UEA ŝi havas multajn amikojn kaj estas ŝatata parto de la vivo de multaj homoj. Krome kompreneble en la laborejo kaj en la familio ŝi estis kaj estas unikaĵo.

Pri du el la supre menciitaj talentoj kaj okupoj ni volas iomete rakonti:

Dum la jaroj Astrid verkis centojn da kantoj kun miloj da strofoj – por amikoj, por nekonatoj, por DEFA, Jernbanefritid k.s. Neniu verspiedo estis en malĝusta loko, neniu apostrofo metita nur por preni 'la facilan vojon' por trovi rimon. Nur pri unu malsukceso mi scias (kaj ne estis la kulpo de Astrid) : iam por IFEF-skisemajno Astrid verkis bonegan kanton laŭ internacie konata melodio ... sed kelkaj alilandanoj simple rifuzis kunkanti: 'Ni ja ne konas la tekston!' Ni ĝoju, ke ni en Danio havas tiun belan tradicion pri 'porokazaj kantoj', tiel ke ni povas ĝui la trafajn, amuzajn kaj belajn tekstojn, kiujn verkis Astrid.

Dum multaj jaroj Astrid ĉiam havis ĉe si sian pasporton ... '... se iu demandus al mi iri hodiaŭ al Puttgarten por kontrabandi!'. Multfoje ŝi kun amikoj kaj kolegoj iris, multajn akirindajn aferojn ŝi hejmenportis. Kiam en la doganejo oni fluustris en la vico: 'Hodiaŭ la doganistoj estas ĉi tiel', Astrid ĉiam diris: 'Ni estu dankemaj pro la multaj tagoj, dum kiuj ili ne deĝoris!'.



Ni kore gratulas kaj deziras ĉion bonan al nia karulino.

DEFA

Fervojo en Islando

La plej konata islanda fervojo estas la Rejĵkjavika Haven-Fervojo kun 900 mm larĝa ŝpuro. Ĝi funkciis 1913-1928 dum konstruo de la havenaj ond-rompiloj. La itinero komencis ĉe ŝtomminejo ekster la urbo kaj kuris tra tereno, kiu nun estas parte meze en la urbo kaj ankaŭ, kie nun troviĝas la urba Rejĵkjavika flughave (ne Keflavik) ...

Post havenkonstruado en Rejĵkjavik la dana firmao N. C. Monberg vendis du el la lokomotivoj uzitaj ĉe la konstrulaboro al Islando: la lokomotivoj Minör kaj Pionér, Minör jam portis tiun nomon, kiam ĝi laboris en Danio. Ĝi estis konstruita de la Arnold Jung-lokomotivfabriko en 1892 kun konstrunumero 129, laboris ĉe la haveno en Rejĵkaviko de 1913 ĝis paneo en 1916. Poste oni rekonstruis ĝin kiel muzean lokomotivon Por Minör oni 'rabis' partojn de Pioner (de sama fabriko, konstrunumero 130). Jam delonge Minör havas sian lokon ĉe la haveno de Rejĵkjaviko. Ĝi aperas sur islanda poŝtmarko de 1999:



Se vi atente rigardas, oni skribas EIMRELBIN ... EIM = vaporo, REL = reĵo, BIN = aŭto

Cetere Islando havis/havas plurajn havenajn kaj minejajn fervojojn – laŭ miaj informoj minimume du minejaj fervojoj ankoraŭ funkcias.

Fervoja novaĵo de Danio

Neatendita informo pri poluado en trajnvagonoj.

La plimulto opinias verŝajne, ke se oni veturas per trajno, oni ricevas malpli da poluado ol se oni alimaniere transportas sin. Sed - novaj esploroj montras, ke la poluado de dizeloleaj partikloj, se oni troviĝas en trajnvagono post dizela lokomotivo, estas same granda, kiel se oni troviĝas en plena areo sur unu el la plej multtrafikataj strategoj en Kopenhago.

Surprizo!!!



Unu el la lokomotivtipoj, kiuj devas havi novajn filtrojn.

Fotis: Jan Uldal Niemann

DSB promesas antaŭ la jarkonfinado 2013 instali filtrilojn en la dizelaj lokomotivoj, kaj oni konsilas al pasaĝeroj sidi en la vagonoj, kiuj estas ne tute proksimaj al la lokomotivo.

Oni povas sin demandi, ĉu en la novaj IC4-trajnkompletoj jam troviĝas tiaj filtroj ...

Temo de la jaro

Ankaŭ por 2013 ni sukcesis decidi pri temo ... ni elektis SAMIDEANOJN. En Esperantio ni multe parolas pri samideanoj – ni ja ĉiuj estas – sed ni trovis kvar personojn ekster Esperantio, kiuj estas kun Zamenhof samtempuloj (proksimume) kaj samideanoj – en la senco, ke ili volis la pacon kaj ĉiu en sia maniero laboris pri tio. Do, antaŭĝoju konatiĝi kun kelkaj interesaj kaj por la mondo signifaj personoj.

Albert Schweitzer (1875 – 1965) – multtalenta, admirata kaj kritikata.

Verŝajne la plimulto konas la nomon *Albert Schweitzer* en rilato kun *AFRIKO, GABON, LAMBARÉNÉ, NOBEL-pacpremio* ... sed la historio estas multflanka.

La fruaj jaroj

Albert naskiĝis en alemana-elsasa familio in *Kaysersberg*. Li estis filo de evangelika pastro kaj ties edzino (kiu estis filino de pastro). Jam en la naskiĝjaro de la filo la familio translokiĝis al *Günsbach*, kie *Albert* pasigis siajn infanajn jarojn. Lia gepatra lingvo estis la elsasa loka dialekto de la alemana lingvo. En la familio oni parolis ankaŭ la francan, kaj la altgermanan li lernis en la lernejo.

Post gimnazia ekzameno en *Mühlhausen Albert* iris al *Strassburg*, kie li studis teologion kaj filozofion. Krome li studis en Parizo pri organludado ĉe *Charles-Marie Widor*, sufiĉe konata organludisto, komponisto kaj muzikinstruisto.



La Juna Albert Schweitzer

Fonto: Messiah College

En Berlino en 1899 oni akceptis lian disertacion en filozofio (jam la titolon mi tute ne komprenas!), kaj li fariĝis *Dr. Phil.*, kaj en 1901 sekvis disertacio en teologio, kaj per ĝi li akiris la titolon *Lic. Theol.* – tiun disertacion li eĉ reverkis kaj eldonis plurfoje. En 1902 li plenumis la pastran ordinaron en la evangelika teologio kaj fariĝis docento ĉe la Strassburga universitato kaj samtempe pastro ĉe la preĝejo *St. Nikolaj*. En 1905 li eldonis la francan version de la libro 'Johann Sébastien Bach', kaj surbaze de ĝi li tri jarojn poste eldonis sian propran monografion pri *Bach*.

Certe vi jam komprenas, ke temas pri multtalenta kaj energia persono – kaj por li ĉio tio ne sufiĉis. De 1905 ĝis 1913 li studis medicinon en *Strassburg* - oni apenaŭ enlasis lin, ĉar li estis jam docento, tamen en alia fako. En 1912 li fariĝis kuracisto, kaj la jaron poste oni asignis al li

dum la subtenantaj landoj havas ankaŭ siajn reprezentantojn. La malsanulejo nun servas al ĉ. 50.000 homoj en la regiono, kaj estas 160 dungitoj. Ĉiutage 140 homoj vizitas la ambulatorion, kaj oni faras 2200 operaciojn ĉiutage. Entute oni havas ĉ. 150 litojn por pacientoj.



Memorstato en Weimar, Germanio

Fonto : Vikipedio

... portas la nomon

Preĝejoj, lernejoj kaj infan-vilaĝoj dise en la mondo portas la nomon de *Albert Schweitzer* kaj ricevas subtenon de la fondaĵo. Li aperas sur poŝtmarkoj, kaj li restas fama kaj grava persono. En sia maniero li servis al la homaro uzante siajn fakajn konojn kaj esprimante siajn opiniojn.

Ankaŭ al Danio li venis por ricevi gravan honorigon, nome la 'Sonning'-premion, kiun li ricevis kiel la unua en 1959. La premion oni atribuas pro elstara laboro por la bono de eŭropa kulturo. Inter la postaj ricevantoj estas *William Heinesen*, *Ingmar Bergman*, *Václav Havel* kaj *Dario Fo*.

LN

Fonto : Vikipedio

Ĝis tiam *Albert Schweitzer* klopodis ne miksiĝi en politikaj diskutoj, sed per sia engaĝiĝo en la batalo kontraŭ atomarmiloj tio ŝanĝiĝis. Li verkis plurajn leterojn kaj artikolojn, sed kiam amikoj de li – inter tiuj *Albert Einstein* – instigis al li pli uzi sian influon, li tamen hezitis, ĉar li ne estis fakulo pri fiziko ... kaj sekve li (kompreneble) komencis studi atomfizikon! Li ne ekzamenigis, sed sentis tamen en aprilo 1957, ke li kapablis paroli 'kun la rajto de fakulo', kaj li 'parolis tra la norvega Nobel-komitato' kaj subskribis proteston kune kun multaj aliaj sciencistoj. Ankaŭ kritikon li ricevis, ĉar laŭ kelkaj opinioj li klopodis miksi tro da aferoj en tiun batalon.

Kiam en 1963 la interkonsento pri haltigo de la nuklearaj eksplod-provoj estis subskribita, *Schweitzer* gratulis al *Kennedy* kaj *Krusjov*, kaj pli poste li denove protestis, ĉar subterajn provojn oni daŭre permesis.

Fine de la 1950aj jaroj oni multe kritikis *Schweitzer* pro la opiniesprimoj pri atomarmiloj, sed verŝajne la plimulto, kiuj kritikis, nur ne samopiniis kun li. Ankaŭ pri la malsanulejo en *Lambaréné* estis kritiko. La administra direktoro de la malsanulejo 1963-1966, *André Audouynaud*, kritikis, ke *Schweitzer*

- ne renovigis la konstruaĵojn kaj ekipaĵojn
- ne bone traktis la lokajn homojn
- agis kiel 'kolonia reĝo'
- restis fremda al Afriko kaj ties kulturo
- ne (malgraŭ granda subteno) multon atingis

... bedaŭrinde tiu bastanta kritiko publikigis nur en 2005, kiam *Schweitzer* jam delonge estis morta kaj preskaŭ neniu atestanto al tio ĉio ankoraŭ vivis. La dokumenta filmo '*Albert Schweitzer*' (1957) kontraŭpruvas almenaŭ parton de tiu kritiko.

Postmorta reputacio

Lambaréné.

En 1964, unu jaron antaŭ sia morto, *Schweitzer* transdonis la gvidadon de sia 'korinfano' al aliaj. Ekde 1974 fondaĵo posedas kaj stiras la malsanulejon. En la estraro de tiu fondaĵo la plimulto estas de Gabobo,

profesoran katedron 'pro rimarkindaj sciencaj atingoj'. La jaron poste sekvis lia disertacio, per kio li doktoriĝis.

Do, en la aĝo de 38, antraŭ ol iri al Afriko por la unua fojo, jam li doktoriĝis en tri fakoj, estis pastro kaj fariĝis profesoro.

En 1912 *Albert* edziniĝis kun *Helene Bresslau* (1879-1957), kaj en 1919 naskiĝis la filino *Rhena Schweitzer-Miller*, kiu ĝis 1970 prezidis la fondaĵon de sia patro. Ŝi mortis en 2009.

Afriko

La delto de la rivero *Ogooué* kovras grandan areon de la teritorio de Gabono. La urbo *Lambaréné*, nun kun 24.000 enloĝantoj, situas mezokcidente en la lando.



La Afriko de *Albert Schweitzer* - *Afrique-Équatoriale Française*, la nuna Gabono
La urbo *Lambaréné* estas markita per sago

Fonto: Vikipedio

En 1913 *Albert Schweitzer* agis laŭ sia vizio kaj fondis en *Afrique-Équatoriale Française* (nuna Gabono) ĉe la rivero *Ogooué* la ĝangalhospitalon *Lambaréné*. Jam en 1914, post la eksplodo de la unua mondmilito, li kun sia edzino estis metita en hejmarresto per la franca armeo, ĉar ili estis germanoj. En 1917, elĉerptaj post kvar jaroj da senĉesa laboro kaj suferantaj de iu speco de tropika anemio, la geedzoj estis arestitaj kaj transportitaj unue al *Bordeaux*, poste al *Garaison* kaj fine al *St. Remy de Provence*. Kie ili pasigis la tempon ĝis julio 1918 – daŭre formale arestataj. La tempon uzis *Albert Schweitzer* por plievoli sin mem kaj sian etikon, de kiu centra frazo estis: **‘Ich bin Leben, das leben will, inmitten von Leben, das leben will’** (**Mi estas vivo, kiu volas vivi, meze en vivo, kiu volas vivi!**).

Kiam la milito finiĝis, la paro denove povis iri loĝi en Elsasio, kiu nun apartenis al Francio, kaj ili fariĝis francaj civitanoj. Komence de decembro 1918 *Albert Schweitzer* denove prenis la postenon kiel pastro ĉe *St. Nikolaj*, kaj li komencis labori kiel kuracisto en malsanulejo strasburga. Ekde 1920 li vojaĝis kaj prelegis pri sia etiko ‘Respekto por la vivo’, kaj li donis orgenkoncertojn kaj tiel akiris monon por reiro al Afriko en 1924. Li volis pligrandigi la malsanulejon en *Lambaréné*.

Politika sinteno

Li fariĝis tre konata pro sia libro *‘Zwischen Wasser und Urwald’* (‘Inter akvo kaj ĝangalo’), kiun li verkis en 1921 pri travivaĵoj kaj spertoj de kuracisto en Afriko ... kaj dum la venontaj jaroj li fariĝis pli kaj pli konscia kaj aktiva en la publika debato. Tiel li en 1932 en *Frankfurt (M)* prelegis okaze de la centa datreveno de la morto de *Johann Wolfgang von Goethe*, kaj li forte avertis kontraŭ la komenciganta nazismo.

Post la Dua Mondmilito li ricevis multan honoron – li ricevis en 1952 la Nobel-pacpremio, kaj dum sia dankparolado (kiu okazis nur du jarojn poste) li diris: ‘La milito igas nin malhumanecaj.’ Li opiniis, ke la establo de la ‘Konvencio de *Genève*’ kaj la fondiĝo de Ruĝa Kruĉo kaŭzis, iun senton de ‘humanecigo de la milito’ ĉe la homoj, tiel ke ili ne prenas sufiĉe serioze la minacon pri milito. Tio estas nur unu kazo de lia tre strikta vivpensado. Liaj filozofia kaj religia aliroj al ĉio en sia vivo kaŭzis, ke li estis fidele ĝis la fino al siaj ideoj kaj opinioj. Li estis tre konsekven-

ca kaj sincera homo kaj volis, ke ĉiam, oni konkludu kaj sekvi tiujn konkludojn – li postulis tion de si mem, kaj li postulis tion de aliaj.

Tio bone kongruas kun la sistema kaj senlaca energio de *Albert Schweitzer* – li ne volis esprimi sin publike pri iu temo sen SCII pri la afero ... kaj bone klarigas ankaŭ lian fascion de la muziko de Johann Sebastian Bach – strikta, bonorda, baroka muziko.

Kiam *Albert Schweitzer* revenis al sia hejmlando, nun franca regiono, li estis 44 jaraĝa. Pri si mem li diris ĉiam, ke li estas ‘elsasano kaj mondĉiviano’. Li majstris germanan kaj francan lingvojn same bone, kaj kun la filo de sia kuzino, la franca filozofa *Jean-Paul-Sartre*, li povis diskuti pri ekzistadismo.



Fonto: Vikipedio

Pli aĝa Albert Schweitzer